



PILO-PRESS

Internacia
Informservo

Subtenu la informan

laboron de
Pilo-Press !

Jus aperis la
n-ro 14/76 de la
germana eldono END

Eldonanto/Herausgeber:
Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (09 11) 46 36 49; 5142 69

N-ro 29/76 - 19 jul 1976
Aperas ĉiusemajne

Freinet-Movado kaj Esperanto

Varsovio (ju/pp) - Ĉiujara konferenco de la ĉiam pli populara en la mondo pedagogia movado, Pedagogia Freinet-Movado por Moderna Lernejo, lanĉita antaŭ 50 jaroj far la franca instruisto C. Freinet okazas nunjare en Pollando. Ĝin organizas oficiale Instituto por Progresigo de Instruistoj de la pola eduk-ministerio sub la efektiva prizorgo de la Ministro por Klerigo kaj Edukado.

La laboroj de la konferenco - okazantaj laŭ la metodoj kaj instru-teknikoj de Freinet - realiĝos helpe de tri laborlingvoj: la pola, la franca kaj Esperanto. La Freinet-Movado ekde la komenco lanĉas en siaj teknikoj aplikadon de Esperanto, ĉar Freinet mem estis esperantisto kaj instruis la lingvon. Sed ekde kelkaj jaroj Esperanto ankaŭ oficiale fariĝis laborlingvo de la jarkonferencoj internaciaj de la movado RIDEF.

En la ĉi-jara konferenco, kiu okazos en la najbara al Varsovio, petrolindustria urbo Plock, en la tagoj de la 2a ĝis la 16-a de aŭgusto, partoprenos 10 instruistoj-esperantistoj el Pollando, oficiale invititaj de la organizantoj, kaj grupo de alilandaj samideanoj. Ĉar post Francio la pedagogiaj teknikoj de Freinet estas plej larĝe studataj kaj aplikataj en Pollando, la RIDEF-konferenco altiras atenton de gravaj polaj klerigaj kaj edukaj instancoj kaj organizaĵoj. Praktika labora apliko de Esperanto ĉi tie povas serioze firmigi ĝian aprezon en ĉi tiu medio. Saĝnas, ke la pedagogoj-esperantistoj devas pli atenti la Freinet-Movadon.

Pri la karaktero de RIDEF kaj ĝia trapaso en Plock informos amplekse "Pola Esperantisto". Ĝi publikigos i.a. intervjuon kun la animanto de Esperanto-aplikoj en la Freinet-movado, prof. Jean Marin, 9 rue Adrien Lejeune, F-93170 Bagnolet, Francio.

Esperanto-aranĝo de la lerneja konsilantaro de Vieno

Vieno (pp) - La lerneja konsilantaro por la urbo Vieno okazigis la 15-an de junio 1976 en la Pedagogia Instituto informan kunvenon, en kiu estis prezentitaj la atingitaj rezultoj de la instalitaj Esperantoklasoj dum la ĵus finiĝinta lernejararo.

La kunvenintoj estis kore salutitaj en la nomo de la prezidanto de la urba lerneja konsilantaro, s-ro Hofrat d-ro Hermann Schnell. Poste gelernantoj el la 9-a, 14-a kaj 21-a distriktoj aŭdigis al sufiĉe multnombra publiko de kunlernantoj, gepatroj, instruistoj kaj Esperanto-amikoj kantojn kaj mallongajn scenojn en Esperanto. Kiel eksterurbaj gastoj partoprenis Esperantoklaso el la najbara urbo Himberg situanta en Malsupra Aŭstrio. Inter la aŭskultantoj, kiuj multe aplaudis, estis ankaŭ eksterlanda gastoj, nome Marinus de Waard, Roterdamo.

Ĉapitro pri Esperanto

Moskvo (pp) - En la popularsciencia verko "Vojaĝo en la vorton" de E. E. Vartanjan, kiu antaŭ nelonge aperis en Moskvo en cent mil ekzempleroj, enestas tre bona ĉapitro pri Esperanto, inkluzivanta ankaŭ koncizan gramatikon kaj vortareton. (Laŭ Radio Roma)

Eŭropa libroserio pri malnaciigita scienco

Paderborn (pp) - Gustateme antaŭ la komencigo de la Internaciaj Someraj Universitataj Semajnoj, aranĝitaj de la Eŭropa Klubo en Pirmoŝteno de la 16-a ĝis la 30-a de julio, aperis la unua volumo de scienca libroserio por "malnaciigita scienco" kun la titolo "Bildung und Berechnung - Klerigo kaj Prikalkulado" (Eldonejo difo-Druck Schmach, Bamberg). Tiu volumo, eldonita de Hermann Behrmann kaj S. Stimek, enhavas 8 klerigteknologiajn, informadikajn, matematikajn kaj psikologiajn kontribuojn de germanaj, jugoslaviaj kaj norvegiaj docentoj de la Someraj Universitataj Semajnoj, en germana kaj internacia (Esperanta) lingvoj. Sekvos pliaj volumoj. Tiucele estis fondita scienca konsilantaro, al kiu apartenas 36 profesoroj el 11 landoj.

Pozitiva recenzo de "Mia amata Esperanto"

Winterthur (pp) - En la - inter la esperantistoj jam konata - svisa ĵurnalo "Der Landbote", Winterthur, n-ro 161 de la 15-a de julio 1976 aperis vere tre pozitiva recenzo de la ĵus aperinta poŝlibro en germana lingvo "Mein geliebtes Esperanto" (Mia amata Esperanto) de Richard Schulz en la felietona rubriko de la gazeto. La recenzisto a.b. skribas i.a.: "Kaj cetere, oni ja aŭdas tiom malmulte pri Esperanto. En tiu afero ne estas surprizo, pri kiuj la gazetoj devas raporti. Ke la internacia lingvo funkcias kaj estas uzata diligente de ĝiaj adeptoj, ja jam delonge ne plu estas sensacio. Unu tamen ĵus trarompis la muron de la silentado kaj rakontas ĉion, kio estas notinda pri Esperanto. Li estas emerita gimnazia instruisto kun la nomo Richard Schulz kaj la eldonejo Bleicher en Gerlingen disponigis al li la forumon en formo de nefikcia libro." Per la publikigo de informaj, bone verkitaĵoj, kiel "Mia amata Esperanto" fariĝis, oni povas alproksimigi Esperanton al la publiko, opinias la recenzisto. Cetere la recenza surskribo tekstis "Esperanto, von allen Seiten beleuchtet" (Esperanto, heligita el ĉiuj flankoj).

Lingva diskriminacio en la italaj lernejoj

Laŭ Esperanto-Redakcio de Radio Roma

La verkotasko proponita ĉijare al la kandidatoj por la abiturienta ekzameno en la italaj lernejoj estas aparte stimula por tiuj, kiuj interesiĝas pri lingva diskriminacio. Temas pri frazo eltirita el la libro "Lettera a una professoressa" (Letero al iu profesorino), kolektive verkita, antaŭ kelkaj jaroj, de la lernantoj de toskania lernejo en la vilaĝo Barbiana: la libro, kiu prezentis en formo simpla sed trafa la postulojn pri novaj pedagogiaj metodoj; siateme vekis grandan intereson kaj naskis novajn iniciatojn, precipe kun la celo forigi superfluaĵojn el la instruota kulturo kaj ebligi al ĉiuj plenan disvolvigon de propra personeco, sendepende de la sociaj kondiĉoj de la koncernaj familioj.

La frazo kiu estas proponita al la kandidatoj por komentado, diras: "Estas nur la lingvo, ja, kiu igas egalaj. Egala estas tiu, kiu kapablas esprimi sin, kaj komprenas la esprimon de la aliaj. Ĉu li estas riĉa aŭ malriĉa, tio malpli gravas. Sufiĉas, ke li parolu!".

La dirita frazo estas aparte signifoplena, se oni konsideras, ke en Italujo, sekve de la vastaj internaj migradoj de la lastaj jardekoj, multaj gefiloj de sudaj laboristoj elmigrantaj al la nordo ne kapablas bone esprimi sin kaj kompreni la kamaradojn en la itala normlingvo aŭ en la loka dialekto, kaj tio kaŭzas faktajn diskriminaciojn kaj psikajn malfacilaĵojn: por siciliano, kiu konas nur la sicilian dialekton, vivi en Torino aŭ en Milano estas preskaŭ same kiel vivi en Marsejlo aŭ en Zuriĉo, el la vidpunkto de komunik-eblecoj kaj integriĝo en la loka socio. Komprenoble, oni ne devas subtaksi la sociajn elementojn.

do oni ne devas diri, ke nur el la lingva diverseco naskiĝas subpremado, indiferenteco, antaŭjuĝoj: sed oni ne povas nei, ke tiuj malagrablaj sintenoj trovas fekundan grundon en la lingvaj malfacilaĵoj, ankaŭ interne de la sama nacio.

Fremdaj lingvoj malpermesitaj

Laŭ la franca ĵurnalo "Le Monde" de la 11-a de junio 1976, Radio Phnom-Pen anoncis, la 8-an de junio, ke la uzado de fremdaj lingvoj estas malpermesita en Kamboĝo. "La lando - diris la anoncisto - devas lukti por konservi siajn kutimojn kaj siajn tradiciajn vivmanierojn." (Laŭ Radio Roma)

Konversacia Kurso

Nürnberg (pp) - Kiel ni jam informis, Germana Esperanta Fervojista Asocio (GEFA) eldonis perfektigan lernolibron sub la titolo "Konversacia Kurso" de Heinz Dieter Hartig; formato Din A 5, broŝ., 46 p., prezo 6,-- DM + 10 % afranko. (Vidu PP n-ro 27/1976, p. 3).

La libro estas havebla ĉe Libroservo Ludwig Pickel, Postfach 2113, D-8500 Nürnberg 1, Postscheckkonto Nürnberg 819 56-851.

Libroservoj mendu ĉe GEFA-sekretario Joachim Schrapp, Schmittingheide 17 d, D-4400 Münster, F R Germanio.

Etnaj problemoj en Sudorienta Eŭropo

Tiu 12-paĝa broŝuro de Rudolf Grulich, pri kiu ni jam raportis, estas same havebla ĉe Libroservo Ludwig Pickel, Postfach 2113, D-8500 Nürnberg 1. Prezo 2,- DM inkl. afranko. Libroservoj mendu ĉe Uwe Joachim Moritz, Feldstr. 38, D-5190 Stolberg.

Esperanto en radio

Varsovio. La Varsoviaj elsendoj parte jam estis sub la signo de la Olimpiaj Ludoj en Montrealo. Oni povis aŭdi felietonojn pri polaj sportistoj, kiuj en la pasinteco sukcese partoprenis tiujn ludojn, kaj sabate vespere estis disaŭdigita felietono pri la "olimpia ideo". Tiu felietono prezentis tiun ideon en la ideala senco, kvazaŭ tiu olimpia ideo estus ankoraŭ en ordo, sen makuloj. - Ankaŭ la Esperanto-Ekspreso estis parte dediĉita al la Montrealaj Ludoj, oni povis aŭdi la rubrikon "Esperanto ankaŭ en la sporto" kaj citaĵojn pri la strebadoj esperantistaj enkonduki Esperanton en la sporton laŭ artikoloj en la hungarlingva "Esperanto-magazin". Ampleksa estis la rubriko "Novaĵoj de Pilo-Press". - Malgraŭ la feria tempo, dum kiuj en pasintaj jaroj, la alfluo de korespondataĵoj malkreskis, ĉi-jare tiu alfluo restas konstanta; dum la pasinta semajno alvenis 121 korespondataĵoj.

Radio Vatikana. Bone mi aŭdis la kelkajn frazojn en Esperanto duonan horon post noktomezo (dum la nokto de sabato al dimanĉo) kadre de muzika programo. Ĉi-foje la Esperanto-informo varbis por ĉiutaga matena meso en latina lingvo kun nacilingvaj klarigoj de Radio Vatikana.

Zagrebo. Ĉi-foje Radio Zagrebo post la kutimaj novaĵoj el Jugoslavio raportis pri mara akcidento de veloŝipo, kiu postulis viktimojn inter germanaj turistoj en la Adriatika maro.

Vieno. La ĉi-semajna komentario temis i.a. pri la registara socialpolitiko, kiu laŭ la opozicio estas tro multekosta, kaj pri la multe diskutata sinteno de komunistaj partioj en la okcidento, al kies deklaroj kanceliero Kreisky tamen malfidas. - La kultura parto de la elsendo temis pri vizito al la mediteranea insulo Malta, pri kiu parolis la aŭtoro, Johann Bronec, kaj Siglinde Stamm. La leterkesto nomis la poŝlibron "Mia amata Esperanto" "vere bonega germanlingva libro."

Svisa Kurtonda Radio. Ĉiam interesaj estas la prelegoj de d-ro A. Baur pri svisaj temoj. Pasintsemajne li parolis pri problemoj de flughaveno Klothén, kies plivastigaj konstrulaboroj nun finiĝis. En tiu prelego li uzis la neologismon "terminalo" kiun li pravigis kiel necesan vorton. - En la ĉi-semajna elsendo li rakontas pri la historio de radio-elsendoj en romanĉa lingvo. Parte li raportis pri personaj travivaĵoj, ekz. renkontiĝo kun Edmond Privat dum kunsido de radio-societoj. - Post G. Silber nun gastas usona esperantisto ĉe la svisa mikrofono, nome d-ro Richard Wood. Li parolis pri siaj spertoj dum la restado en la Kultura Centro Esperantista kaj la Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Internacia Lingvo (CDELI) en la Chaux-de-Fonds, kiujn li alte taksas. Dum sia restado li ankaŭ kontribuis al la svisa kampanjo "Esperanto en la lernejojn" gvidata de s-ro Olivier Tzaut. - Sed eble kelkloke d-ro Wood tro optimisme prijuĝis la eblecojn kaj efikojn de tiuj E-institucioj. Ĉu vere Esperanto povus ludi gravan rolon en la komunikado inter la diversaj lingvogrupoj de Svislando, nuntempe?

Romo. En dimanĉa elsendo oni povis aŭdi interesan statistikon pri la alvenintaj korespondaĵoj dum la unua jarduono.

De la 1.1. ĝis 30.6.76 alvenis ĉe la Esperanto-Redakcio de Radio Roma 614 korespondaĵoj (leteroj, kartoj, sonbendoj kaj presaĵoj). Tio signifas, ke verŝajne ĉe la fino de la kuranta jaro oni atingos, pli-malpli, la saman nombron kiel pasintjare; tio estas ĝojiga fakto, se oni konsideras, ke pasintjare oni havis "rekordan" korespondadon, sed ni ne povas esti plene kontentaj, - opinias la redakcio -, ĉar la suma kvanto de korespondaĵoj estas ankoraŭ tre malalta kompare kun la potencialo de la Esperanto-movado kaj kun la bezonoj de nia redakcio. Laŭvorte la redakcio diris: "Pro tio, ni insiste ripetas nian alvokon skribi al ni, sendepende ĉu oni sukcesas kapti niajn elsendojn (en tiu kazo, des pli bone!) aŭ oni troviĝas en regiono, kie nia voĉo ne alvenas. Ne tiel gravas la enhavo de la korespondaĵoj, kiel ilia nombro: kompreneble, ni ĉiam kun aparta ĝojo legas interesajn kontribuadojn, sed ankaŭ simpla poŝtkarto kun malmultaj salutvortoj estas por ni utila. Korespondaĵojn oni bonvolu adresi al "Radio Roma, Esperanto", kaj ne al la personoj de la prizorgantoj, almenaŭ en la adreso, alie ili estas konsiderataj kiel privataj. Kaj oni bonvolu skribi al la adreso de la Radio, poŝtkesto 320, I-00100 Roma, Italujo, por ke ĉiuj korespondaĵoj trairu la saman vojon kaj estu listigataj de lasama oficejo. Antaŭdankon!

Kaj nun, ni opinias, ke niaj aŭskultantoj ekscios kun intereso la distribuon laŭlande de la alvenintaj korespondaĵoj. Ankaŭ ĉi-jare, la unuan lokon firme tenas Federacia Respubliko Germanujo, kiu liveris, de la 1-a de januaro ĝis la 30-a de junio 1976-a 137 pecojn; plej multe kontribuis s-ro Ludwig Pickel el Nurnbergo (per la novaĵbulteno "Pilo-Press", per la "Eŭropa Esperanto-revuo" kaj per personaj alskriboj); sekvas s-roj Ernst Höpfler el Lipstadt, Bruno Gahler el Glinde, Wenzel Weber el Mönchengladbach, F.W. Poppeck el Oberkirch, d-ro Josef Kondor el Neuwied. La duan lokon en la statistiko tenas Italujo per 64 pecoj; sekvas Francujo per 59 (kun aparta danko al s-roj Lucien Bourgois kaj Lucien Giloteaux), Nederlando per 53 (aparte kontribuis s-ro Anton A. Leenhard). Jen nun sekvas la resto de la laŭlanda listo: Pollando 36, Hungario 25, Britujo 23, Austrujo 20, Hispanio 20, Finnlando 16, Danlando 16, Ĉeĥoslovakio 15, Svedujo 14, Svislando 14, Grekujo 11, Germana Demokratia Respubliko 10, Popola Ĉinio 9, Bulgario 8, Belgujo 8, Sovetunio 7, Jugoslavio 7, Brazilo 7, Japanio 7, Kolombio 3, Kanado 3, Usono 2, Israelo 2, Portugalio 2, Rumanujo 1, Argentino 1, San Marino 1, Sudafriko 1.

Pilo-Press, semajna informservo internacia, jarabono 30,- GM
Ludwig Pickel, Postfach 2113, D-8500 Nürnberg 1, PSchK Nürnberg
819 56-851